

KONFIDO

Staĉjo revenis hejmen el la lernejo. Lia lasta leciono estis kateĥizado.

- Kion hodiaŭ vi lernis en la lernejo? - demandis lin lia onklino.

- Hodiaŭ – komencis raporti Staĉjo – nia pastro rakontis al ni pri Moseo, kiu savis la elektitan popolon de la faraona armeo. Kiam la Ruĝa Maro haltigis Izraelon kaj ili jam kapablas vidi la egiptajn militistaron, antaŭ ĉio Moseo ordonis flamiĝi milojn da fumiĝantaj kandeloj kaj la izraelaj sapeistoj konstruis la pontonan ponton. Moseo reviziis, ĉu pontonistoj konstruis la fortan ponton, poste li donis signon per sia bastono kaj Izraelo sur ĉi tiu ponto transiris la Ruĝan Maron al la alia marbordo. Pasigis la longa tempo, kiam finfine la egipta armeo trovis vojon trans la grandegaj fumaj nuboj kaj eniris en la izraelan kampon, sed neniu jam ekvidinte, ili rapidege marŝis sur la spuroj de la forfuĝanta Izraelo. Kiam Moseo ekvidis la egiptan militistaron sur la pontona ponto, per sia bastono donis signon al la pontonistoj, kiuj eksplodigis la antaŭe kaŝitan dinamiton. Tiam la

ponto dispeciĝis kaj ĉiuj egiptaj militistoj dronis en la akvo de la Ruĝa Maro.

- Ĉu vere la pastro rakontis tiamaniere ĉi tiun historion al vi?

- Ne, mia onklino, iom aliel. Sed neniu kredus al mi, se mi rakontus tiel, kiel nia pastro rakontis al ni.

La onklino de nia Staĉjo bonege konis la Bibliion kaj ŝi sciis, kiel Moseo transkondukis la Elektitan Nacion el Egiptujo trans Ruĝa Maro ĝis elektita Tero. Pripensu kaj respondu al vi mem: Kial la onklino de Staĉjo ne volis kredi al li? Kiamaniere oni devas paroli, ke niaj aŭskultantoj kredu al ni?

Ĉu vi kapablas ekkredi al mi, kara leganto, ke verdire okazis kolizio de aŭtomobilo kun submarboato? Feliĉe, neniu perdis vivon, neniu estis vundita. Ĉi tiu stranga kolizio okazis en stokholma haveno antaŭ kvindeko da jaroj, kiam ekmalsupreniĝis kaŭze de malfortaj bremsiloj la aŭtomobilo haltigata sur la strato, kiu haltiĝis sur la marborda kajo ĝuste en loko, kien alboridiĝis la submarboato. ■

Sac. Jan Sadowski, OMI